

4/2024

Julio  
Aŭgusto

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

## Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ 41-a Pola Esperanto-Kongreso
- ★ Impresoj pri la 109-a UK en Tanzanio
- ★ La detruita monumento al la juna Zamenhof

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
Koresponda adreso. ul. M. Kopernika 36/40  
00-924 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, rk-lodzo@wp.pl

## **Adreso de redakcio**

Robert Kamiński, ul. Kwiatowa 1/3  
94-227 Łódź polaesperantisto@esperanto.pl

## **Kunlaboro**

Teresa Nemere, CHOE Taesok, Andrzej Sochacki,  
Magdalena Tataro, Adam Wilkus, Roman Dobrzyński

## **ABONOJ**

La abono por 2024 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 67 zlotoj  
eksterlando - 24 eŭroj  
Cifereca (pdf)  
Pollando - 30 zlotoj  
eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002  
swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post  
aldono de bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per

Konto de PEA en UEA: peaa-v;

Detaloj troviĝas ĉe:

<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>  
kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo: <https://www.polishdruk.pl>

Fronta kovrilpaĝo - Pinto de la monto Kilimanĝaro la 17-an de aŭgusto 2024  
je la horo 8.35 – Maciej Zięba kaj Dawid Janiga sukcesis grimpi la monton  
5895 metrojn alta.

## **Estraro de PEA**

Robert Kamiński - prezidanto  
Agnieszka Mozer - vicprezidanto  
Zofia Śmistek - sekretario  
Alina Mozer - kasisto  
Kamil Getka - estrarano  
Bogusław Grabowski - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:  
[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Pola Esperanto-Junularo  
728 294 900 [pej@pej.pl](mailto:pej@pej.pl)

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la aŭtoroj mem.  
Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendas.  
La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.  
Reproso kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto

Bankokonto por donacoj

64 2130 0004 2001 0558 6110 0001  
libervolan monsumon priskribu  
per vorto "Darowizna"



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

Redaktoraj vortoj .....	2
<b>PEA-estraro informas</b>	
<i>Maciej Jaskot</i> , Pola Retradio, Filozofumante .....	3
<b>Eventoj</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , 41-a Pola Esperanto-Kongreso .....	4
<i>Urszula Wieczorek</i> , Nia heroo Zamenhof .....	8
<i>Dorota Mączka</i> , 115 jaroj de Esperanto en Siedlce .....	9
<i>Krzysztof Śliwiński</i> , Universitata Esperanto-kolekto .....	9
<i>Magdalena Tatara</i> , Gastoj en Krakovo .....	10
<b>Mojose</b>	
<i>Pola Esperanto-Junularo</i> , ĈAR revenas! .....	11
<i>TEJO</i> , Granda anonco! Nova estraro de TEJO .....	12
<b>Raportoj, rakontoj</b>	
<i>Roman Dobrzyński</i> , Aruŝo .....	13
<i>Instituto de Nacia Heredaĵo</i> , Lajkonik en Krakovo .....	15
<i>Magdalena Tatara</i> , Impresoj pri la 109-a UK en Tanzanio .....	18
<b>Pri kio ni aŭdas</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , La detruita monumento al la juna Zamenhof .....	21
<i>Robert Kamiński</i> , Pri Esperanto en lingvistika revuo .....	22
<b>Teknikaj novaĵoj el la mondo</b>	
<i>Robert Kamiński</i> , Pollando povas esti en la kosmo .....	22
<b>Vizitindaj lokoj</b>	
<i>Dariusz Caban</i> , Hidrargo, punktoj kaj ŝlikrofi .....	23
<b>Lingvosciencia angulo</b>	
<i>Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko</i> , Lokaj rolvortetoj – <i>preter</i> .....	26
<b>Literaturaĵoj</b>	
<i>Juliusz Słowacki</i> , Kordiano .....	27
<b>Saĝaj pensoj</b>	
<i>Maciej Jaskot</i> , Pri rutinoj .....	31
<b>Leterkesto</b>	
<i>Povilas Jegorovas</i> , BET invitas, <i>Tatjana Georgijevna</i> , Reta kurso de Esperanto .....	32
Kalendaro de Esperanto-aranĝoj .....	33
Diverse, facile, bonguste,	
<i>Ŝlikrofi</i> el Slovenio .....	34
<b>Oni eldonis</b>	
<i>Urszula Zybura</i> , Haiku jazowe, .....	35
<i>Juliusz Słowacki</i> , Kordiano .....	36
<b>Forpasis</b>	
Jaroslav Suchánek, Genowefa Gałas, Marian Możuch, Bożena Pietrzyk .....	36
<b>El la fotogalerio de Andrzej Sochacki</b>	
<i>Andrzej Sochacki</i> , La dua Balta Esperanto-Forumo, 17–22 julio 2003 .....	37

Karaj legantoj

Finiĝis jam la someraj monatoj plenaj de eventoj kaj vojaĝoj. Ni havis jam malantaŭ ni la escepte grandan 41-an Polan Esperanto-Kongreson en Kalisz, la Italan Kongreson de Esperanto kaj la neforgeseblan Universalan Esperanto-Kongreson en Tanzanio. En tiuj aranĝoj partoprenis multaj esperantistoj el Pollando. Mi partoprenis ankaŭ en la pola kaj afrika kongresoj. Multaj aranĝoj kaj multaj aldonaj okupoj rezultigis la malfruon en la eldono de ĉi tiu numero de nia revuo. Tamen, ni sukcesis enmeti en ĝi kelkajn raportojn pri ĉi tiuj eventoj.

Roman Dobrzyński kaj Magdalena Tatara prezentis siajn rememorojn kaj pripensojn pri la kongreso en Tanzanio. Afrikaj travivaĵoj estis vere eksterordinaraj kaj longe restos en nia memoro. Ĉar mi ne sukcesis inviti iun ajn skribi pri la Pola E-kongreso en Kalisz, mi mem verkis raporton pri ĝia enhavo. Mi atendas leterojn de partoprenantoj, kiuj prezentos siajn opiniojn pri la kongreso. Tio certe helpos la Estraron de PEA en la organizado de la sekvontaj kongresoj.

En la ĉapitro "Vizitindaj lokoj", unuafoje ni prezentas interesan lokon ekster nia lando – minejon en la urbo Idrija en Slovenio. La aŭtoro povis viziti ĝin danke al sia vojaĝo al la Itala Kongreso de Esperanto. Ni ankaŭ daŭrigas la serion de artikoloj priskribantaj la kutimojn enskribitaj en la listo de la pola nemateria heredaĵo. Ĉi-foje oni povas ekscii pri la interesa kaj verŝajne malmulte konata krakova tradicio de la "Lajkonik parado".

Vi povas praktiki teknikajn terminojn en la artikolo pri la pola raketo, kiu unuafoje atingis la limon de la kosmo. Pollando estas malproksime malantaŭ de landoj nomataj "kosmaj potencoj", sed niaj unuaj atingoj survoje al la kosmo estas memorindaj. Mi rekomendas interesan artikolon de Maciej Jaskot pri rutinoj kaj invitas al lia podkasto "Filozofumante".

Mi kore invitas vin legi la tutan enhavon de la nuna Pola Esperantisto. La redakcia teamo planas publikigi la venontajn numerojn ĉi-jare en la duobla numero.

*Robert Kamiński*



Maciej Jaskot

## Pola RetRadio



En la retaj elsendoj de Pola RetRadio (aŭskulteblaj en ĝia retejo <https://pola-retradio.org> kaj pere de pluraj podkastoplatformoj kiel *Spotify* aŭ *Apple Podcasts*) vi trovos interesajn interparolojn, informojn pri la E-movado, novaĵojn sciencajn kaj kulturajn.

Aliĝu al la aŭskultantaro de Pola RetRadio en Fejsbuko (Amikaro de Pola Retradio en Esperanto) kaj helpu nin pluevoluigi la projekton, kiu servas al disvastigo de la praktika apliko de Esperanto kaj proksimigas pli vastskalan aplikadon de la lingvo.

Ni antaŭdankas pro ĉiuj senavaraj mondonacoj ĝiritaj al nia UEA-konto **vars-t**.

Aŭskultu nin kaj aŭskultigu aliajn!

## Filozofumante



Se vi ŝatas pripensi viajn elektojn, agojn kaj reagojn kaj vivi ĉiun tagon pli konscie, mi invitas vin kore aŭskulti la podkaston “Filozofumante”. Abonu la podkaston kaj sekvu la programon pere de *Spotify*, *Apple Podcasts* aŭ alia ŝatata de vi apo. La podkastajn epizodojn eblas aŭskulti ankaŭ en Jutubo en la kanalo “Filozofumante”. Aliĝu al lakomunumo de filozofumantoj en Fejsbuko (“Filozofumante”) kaj memoru, ke vi ĉiam povas subteni la podkaston per aĉeto de virtuala kafotaso ĉe [buymeacoffee.com](http://buymeacoffee.com)

(<https://buymeacoffee.com/filozofumante>).

Ĝustatempa vorto estas grava forto

*Robert Kamiński*

## 41-a Pola Esperanto-Kongreso

Dum la tagoj 18-21 de julio, okazis la laŭvica, 41-a Pola Esperanto-Kongreso. Konforme al PEA-planoj, por ke la kongreso "vizitu" ĉiam novajn lokojn, kongresanoj kunvenis en Kalisz. La PEA-estraro proponis ĉi tiun lokon al la esperantistoj en tiu urbo kaj ili konsentis kune organizi la kongreson. La decido okazigi la kongreson en Kalisz rezultigis revigligon de la E-agado en Kalisz. En 2023, estis reaktivigita la PEA-Filio en Kalisz kaj ĝia rendevuejo estas la Klubo de Loĝeja Kooperativo ĉe la str. Serbinowska 25.



La honoraj patronoj de la kongreso estis la urbestro, Krystian Kinastowski kaj la rektoro de la Universitato de Kalisz, profesoro Andrzej Wojtyła. La kunorganizanto de la kongreso estis la Universitato de Kalisz,

kiu disponigis senpagajn ĉambrojn por la kongreso en Collegium Novum - sia ĉefsidejo ĉe la str. Nowy Świat. Danke al la granda laboro de la esperantistoj de Kalisz: Świętosław Fortuna, Sylwia Kwiatkowska kaj Karol Wanat establiĝis kunlaboro kun kelkaj lokaj instancoj, ekemple: publika trafikkompanio, kiu permesis al lakongresanoj veturi senpage per urbaj busoj kaj organizis senpagajn vojaĝojn inter universitataj konstruaĵoj. Tiu ĉi helpo montriĝis tre utila, ĉar la studenta domo *Bulionik*, kie loĝis la kongresanoj, la universitata komplekso, kie okazis la pikniko kaj la universitata ĉefsidejo estis en foraj kvartaloj de la urbo. Ni sukcesis akiri financan subtenon de la Kultura Fondaĵo de Kalisz por organizado de la kongresa arta programo kaj amaskomunikilan patronecon de urbaj gazetoj



La kongreso komenciĝis tradicie ĵaŭde per busvojaĝo al la Kastelo *Gołuchów* kaj al la Muzeo de fama verkistino Maria Dąbrowska en Russów. Post vizito en tiuj tre interesaj lokoj kaj tagmanĝo en la kastela restoracio, ĉiuj revenis al la studenta domo *Bulionik*. Post ripozo kongresanoj per buso venis al la universitata komplekso ĉe la str. Poznańska. En tiu ĉi verda kaj bela loko okazis vespera pikniko, dum kiu ne mankis muziko, dancado kaj kantado de Esperantaj kantoj. Dancoj inkludis polonezon por 40 paroj.

La sekvan tagon okazis la ceremonia malfermo de la kongreso en la impona aŭditorio de *Collegium Novum* kun partopreno de patronoj kaj multnombraj gastoj, dum kiu paroladis sponsoroj kaj gastoj. Profesoro Krzysztof Walczak prezentis prelegon rilatan al la temo de la kongreso kun la titolo "Kalisz, atestanto de tempoj kaj memoro". La muzikan paŭzon plenigis piankoncerto de Aleksandra kaj Julia Czajka. En tiu ĉi tago prelegis Jolanta Christowicz, Anna Zybura, Beata Paluszkiewicz kaj Sylwia Kwiatkowska. La dua tago de la kongreso finiĝis per ĵazkoncerto de la bando de Maciej Fortuna, en kiu kantis esperantlingve Magdalena Howorska kaj ludis Krzysztof Wrombel, Jakub Mirczyński kaj Jakub Kraszewski. Poste okazis publika koncerto de la fama esperantista duopo „Kajto” el Nederlando sur la ĉefa placo apud urbodomo.



La tria tago de la kongreso estis dediĉita al vizitado de Kalisz. Estis kreitaj du grupoj, kiuj estis gviditaj ĉirkaŭ la centro de la urbo fare de turismaj ĉiĉeronoj. Homoj, kiuj ne povis longe promeni, vizitis la urbon per historia urba buso, kiu estis disponigita senpage al la kongresanoj. La urbovizitado finiĝis per renkontiĝo en la urba parko, kie estis plantita la Esperanto-kverko kaj malkovrita la memortabulo. Post tagmanĝo okazis la kongresa programo en la studenta domo. La sabata vespero pleniĝis per la arta programo en la studenta klubo *Hades*.

La lasta tago de la kongreso komenciĝis per Esperanta meso en proksima preĝejo, celebrita de la animzorganto de polaj Esperantistoj, pastro Roman Gmyrek. La dimanĉa programo estis plenigita per pluaj prelegoj kaj finiĝis per la resumo de la kongreso, la enmanigo de diplomoj, danko kaj la oficiala fermo de la kongreso.

En la kongreso partoprenis rekorda nombro de 150 esperantistoj, inter ili estis 15-persona grupo el Francio, po du esperantistoj el Germanio, Nederlando, Hungario kaj po unu el Italio kaj Svedio. Ekde la 90-aj jaroj ĝi



estas la plej multnombra Pola Esperanto-Kongreso. La partoprenantoj loĝis en tri lokoj, ĉar la studenta domo ne havis sufiĉe da litoj. Kvalito de tranoktado en la domo estis bona kaj la restoracio Margo apud *Bulionik* servis bonajn kaj abundajn manĝojn. Kiel la organizanto, mi ne povas facile konkludi, ĉu la partoprenantoj opiniis, ke la kongreso estis sukcesa. Mi esperas, ke tiel estis.



Mi dankas al la grupo de esperantistoj de Kalisz, danke al kiu la kongresa programo estis riĉa kaj interesa. Plia danko ŝuldiĝas al la duopo „Kajto”, kiu tre aktive partoprenis la kongreson kaj multe riĉigis ĝian etoson. Plian dankon mi transdonas al Halina Radoła, kiu diligente tradukis la turismajn ĉiĉeronojn al Esperanto kaj la koncerton de „Kajto” sur la ĉefplaco de Kalisz. Multaj homoj kontribuis al la efektivigo de la kongresa programo kaj mi ŝatus danki ĉiujn pro ilia laboro.

Mi esperas, ke la programo de la 42-a Pola Esperanto-Kongreso estos same riĉa kaj estos kreita de ĉiam kreskanta nombro de polaj kaj eksterlandaj esperantistoj.

Daŭrigo de fotoj sur la paĝo 40 ⇒

★ *Ne venas mont' al monto, sed homo homon renkontas* ★

## Nia heroo Zamenhof

La 21-an de junio, en la parko sur la monto Kamienna Góra apud la Esperanto-kverko, esperantistoj de Gdynia renkontiĝis kun skoltoj de la 44-a migranta teamo "Ŝtuparo". La loko de la renkontiĝo ne estis hazarda. La 2-an de aŭgusto 2009, en Gdynia okazis la postkongreso de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Bjalistoko. Por memori la restadon en nia urbo de esperantistoj el 24 landoj, en la parko estis plantita la Esperanto-kverko. Dum la renkontiĝo pri tiuj momentoj rakontis esperantistoj de Gdynia kaj skoltoj parolis pri sia entreprenita kampanjo "Heroo", gvidata ekde la pasinta skolta jaro. Tre interesis ilin la kreinto de la internacia lingvo kaj liaj ideoj, ankaŭ la esperantista movado. Ili strebis trovi kaj kolekti pri tio diversajn informojn.

La teamo elektis Ludovikon Zamenhof kiel sian heroon. Nun ili prezentos raporton pri la kompanjo al la loka skolta komandanto kaj oficiale prenos la nomon de Ludoviko Zamenhof.



La renkontiĝo finiĝis per agrabla surprizo. La PEA-Filio en Gdynia ricevis portreton de L. Zamenhof kun anaso, pentrita de la teama skoltino Emilka. Anaso estas la simbolo de la 44-a migranta teamo „Ŝtuparo”. Ni kore dankas.

Ekde nun ni kune vizitados kaj prizorgos la kverkon.



## 115 jaroj de Esperanto en Siedlce

Okaze de la 115-a datreveno de la Esperanto-movado en Siedlce, en la Regiona Muzeo en Siedlce, ĉe la str. Piłsudskiego 1, ekde la 25-a de oktobro ĝis la 15-a de decembro 2024 estas prezentata ekspozicio pri Esperanto.

La celo de la ekspozicio estas plurflanka prezento de la agado de PEA-Filio en Siedlce dum la jaroj 1908-1923. La ekspozicio prezentas la historion de esperantistoj de Siedlce, internaciajn kaj naciajn esperantistajn kongresojn, organizitajn en la urbo, klopodojn por nomi la straton Esperanto kaj rememorojn pri la organizado de la Esperanta Ĝakolimpiado. Grava elemento de la ekspozicio estas eltondaĵoj el la loka gazetaro kaj inter ili interesaj intervjuoj kun niaj aktivuloj.

La ekspozicio prezentas ankaŭ la agadon de niaj esperantistoj en la Pola Sekcio de Fervojistaj Esperantistoj, kio rezultigis la organizadon de tri kongresoj en Siedlce. Ni rememorigas la nomojn de homoj de Siedlce, kiuj konas Esperanton, inter ili estas famaj personoj en la historio de la urbo.

En la ekspozicio oni povas vidi riĉan kolekton de kovertoj de korespondado kun esperantistoj el la tuta mondo, donacojn, ricevitaĵojn de esperantistoj, poŝtmarkojn, tradukitaĵojn al Esperanto literaturaĵojn kaj preĝlibrojn. Interesa ekspoziciaĵo estas recepto pri zingibra pano en Esperanto.



---

*Krzysztof Śliwiński*

## Universitata Esperanto-kolekto

Ni invitas vin al la malferma kunveno "50 jaroj de la Esperanta Librokolekto en la Universitata Biblioteko de la Katolika Universitato de

Lublin (KUL) je la 18-a de decembro 2024 (merkredo). La kunveno daŭros de la 10:00 ĝis la 12:00 en la Informcentro de la biblioteko ĉe str. Chopina 27 (4-a etaĝo).

La kunveno okazos dediĉite al la 165-a datreveno de la naskiĝo de Ludoviko L. Zamenhof, kaj alla 50-a datreveno de la fondo de aparta Esperanto-Libro Kolekto en la Universitata Biblioteko la 24-an de oktobro 1964.

La kunvena tagordo estos jena:

1. Mallonga enkonduko pri Ludoviko Zamenhof (1859-1917) kaj la internacia lingvo Esperanto, kaj pri la historio de la Esperanto-movado en Lublin kaj ĝia regiono.

2. Prezento de la Esperanta Libro Kolekto ĉe la biblioteko - ĝiaj originoj, nuna stato kaj perspektivoj post 50 jaroj.

3. "50 novaj eldonaĵoj por la 50-a datreveno" - transdono de libroj al la Universitata Biblioteko de KUL kiel donaco de lublinaj esperantistoj.

4. Impresoj pri la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝa (Tanzanio) kun lumbildoj.

5. Kvizo (por interesitoj): "15 demandoj pri Esperanto" - kadre de la kunvena programo. La plej bonaj respondoj estos premiitaj!

---

*Magdalena Tatara*

## Gastoj en Krakovo

Ĵaŭde la 19-an de septembro okazis renkontiĝo de krakovaj esperantistoj kun vizitantaj Krakovon esperantistoj el kvar landoj. Ni renkontiĝis en la kafejo *Consonni* en krakova malnova urbo.

Profesorino Arko el Ĉinio prelegis pri diferencoj en komunikado inter Ĉinio kaj okcidentaj landoj kaj geesperantistoj el Ukrainio prezentis fotojn pri esperantista boatado kaj biciklado kun BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia).

La renkontiĝo estis bona okazo por praktiki la internacian lingvon, aŭskultante prezentaĵojn kaj babilante ĉe kafo, teo kaj kuko. Kelkaj fotoj pri la renkontiĝo oni povas rigardi ĉe:

<https://photos.app.goo.gl/iJ2VGyZ5PYuhuABt8>, aŭ  
<https://mallonge.net/1gy>



Foto Adam Wilkus

Arko kaj Granda - Gisook OH el Koreio vizitis ankaŭ E-klubon en Sopot kaj Bjalistoko.

## Mojose

*Pola Esperanto-Junularo*

### ĈAR revenas!

La venonta eldono de Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo okazos la 22-24-an de novembro 2024 en Krakovo! La programo inkluzivas ekskurson al la salminejo de Wieliczka kun oficiala turneo en Esperanto, urboludon en Krakovo kaj kulinaran atelieron. Aliĝilo venos baldaŭege!

Rezervu ĉi tiun daton! Vi ne povas maltrafi ĝin!



## Granda anonco!

Ekde nun eblas aliĝi al la 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK), kiu okazos de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 2025 en Cisarua (Bogor), Indonezio!

Atendas vin la 81-a IJK, la unua ekstereŭropa IJK post la kronviroza pandemio kaj la unua en Azio post pli ol unu jardeko. Ĉi tiu kongreso okazos en Alfa Resort Hotel & Conference en la distrikto de Cisarua, ĉirkaŭ 75 kilometrojn sude de la indonezia ĉefurbo, Ĝakarto. Dum la kongreso, partoprenantoj de ĉiuj aĝoj ĝuos la tutan semajnon ĉirkaŭite de montoj kaj tropikaj arbaroj kaj enprofundiĝos en la lokan kulturon. La kongreso ankaŭ proponas grandan okazon por konatiĝi, amikiĝi kaj kunlabori kun samideanoj el diversaj partoj de Azio kaj Oceanio.

Iru tuj al la aliĝilo de la 81-a IJK en la retejo <https://ijk2025.tejo.org/alighilo/> kaj estu inter la unuaj aliĝintoj kontraŭ la plej favoraj prezoj. Atentu, ke la unua aliĝperiodo daŭros ĝis la 31-a de januaro 2025.

Ĉu vi ankoraŭ hezitas aliĝi rapide? Konsideru do nian tre specialan oferton por vi: se vi aliĝas kaj pagas la minimuman antaŭpagon ĝis la 15-a de decembro 2024 (dimanĉo), vi ricevos senpagan T-ĉemizon. Belega Zamenhof-taga donaco, ĉu ne?

Kien ni ĉiuj iru en 2025? Azien, Indonezian! Ĝis baldaŭ en Cisarua!



CISARUA 2025



## Nova estraro de TEJO

La Komitato elektis la Estraron de TEJO por la mandato 2024-2025! Hodiaŭ ni prezentas la novelektitan teamon.

- Prezidanto: Michal Matúšov (KuboF Hromoslav)
- 1-a Vicprezidanto: Lucía Montserrat Fernández Barrera
- 2-a Vicprezidanto: Shneur Agronin (Ŝneoro)
- Ĝenerala Sekretario: Igor Almeida (Ikvero)
- Kasisto: Manohimiharintsara Andrianirina (Mihary)
- Estrarano: Michael Vrazitulis
- Estrarano: Adam Źyłka (Adamo)

La nova Estraro ekoficis jam la 1-an de septembro 2024. Gratulon al ili kaj ni deziras agrablan kunlaboron kaj sukcesan mandaton al ĉiuj!

## Raportoj, rakontoj

*Roman Dobrzyński*

### ARUŜO

Mi veturis kun mia filo Felikso per aviadilo el Varsovio al la insulo Zanzibaro kaj tie ni pasigis interesan restadon dum unu semajno. La 3-an de aŭgusto ni flugis al la afrika lando Tanzanio kaj surteriĝis en la urbo Aruŝo, kie jam komenciĝis la 109-a Universala Kongreso de Esperanto. Ĝi evidentiĝis fenomeno de la Esperanta historio.

En tiu ĉi kongreso, la unua en Afriko, partoprenis 777 esperantistoj el 64 landoj. Plej multe da kongresanoj estis junaj afrikanoj el 16 landoj: Angolo 2, Benino 5, Burundo 73, Centr-Afriko 1, Gabono 1, Gambio 1, Kameruno 2, Kenjo 7, Demokrata Respubliko Kongo 76, Madagaskaro 6, Ruando 2, Senegalo 7, Sud-Afriko 2, Tanzanio 127, Togolando 2, Ugando 3.

Afrikanoj nombris sume 427, ili superis la nombron de la kongresanoj el la resto de la tutmonda Esperantujo.

En la pasintaj 108 Universalaj Esperanto-Kongresoj ĉiam partoprenis plej multe da eŭropanoj. Francio kaj Germanio sendadis po centoj da aliĝintoj, sed ĉi-foje venis nur 49 francoj kaj 49 germanoj, krome 31 italoj, 21 poloj, 17 belgoj, 14 britoj, 13 hispanoj 10 svisoj.



Aliaj eŭropaj kongresanoj estis unuciferaj: Aŭstrio 1, Islando 1, Litovio 1, Portugalio 1, Estonio 2, Norvegio 2, Rumanio 3, Danio 3, Kroatio 3, Finnlando 4, Ukrainio 4, Rusio 5, Ĉeĥio 6, Nederlando 6, Svedio 7, Hungario 8, Luksemburgo 8, Slovakio 8. Sume kongresis en Aruŝo nur 291 eŭropanoj.

Ĉu katastrofo!?

Jen la resto de la mondo: Argentino 1, Aŭstralio 5, Bolivio 1, Brazilo 21, Ĉinio 26, Indonezio 2, Irano 2, Israelo 2, Japanio 30, Kolombio 1, Korea Resp. 27, Meksiko 1, Mongolio 3, Nepalo 3, Pakistano 1, Turkio 2, Usono 25.

Ĉu tiu ĉi statistiko malfermas la novan epokon de Esperantujo?

Mi ĝuis eksterordinaran impreson dum la kongreso. Kunsidoj de la komitato kaj estraro de UEA, organizaj aferoj kaj prelegoj ĉi-foje jam ne montriĝis al mi gravaj. Mi eksentis urĝan bezonon de afrikaj kongresanoj paroli Esperante. Multaj el ili havis okazon babili kun eksterlandanoj la unuan fojon en sia vivo. Mi decidis diligente plenumi tiun ĉi taskon. Afrikaj samideanoj entuziasme konversaciis, demandis, rakontis pri si mem kaj laŭdis la facilecon de Esperanto. Mi eksciis, ke en Tanzanio funkcias proksimume 200 lingvoj. Tanzanianoj kaj aliaj afrikanoj parolas unue



idiomojn de siaj triboj, due la devigan svahilan en Tanzanio kaj Kenjo, trie la anglan, francan aŭ aliajn lingvojn de iamaj koloniistaj landoj.

Mirigis min la klara prononco de afrikanaj esperantistoj. Estis plezuro aŭskulti multajn paroladojn de tanzaniaj gravuloj, tamen ne pro iliaj enhavoj, sed pro klarega Esperanta interpretado de tradukantoj. En artaj programoj afrikanoj ankaŭ sukcese uzadis Esperanton por prezenti sian kulturon. Dum la merkreda tuttaga ekskurso en la Nacia Parko de Aruŝo ni povis rigardi distance ĝirafojn, zebrojn, elefantojn, poste danĝerajn serpentojn en kaĝoj. Tio estis denove okazo aŭskulti inteligentan klarigon de nia gvidanto Jean de Dieu Kikako. Okazis ankaŭ interesa vizito en la vilaĝo de Masajoj, la specifa migranta tribo, kiu havas siajn neskribitajn leĝojn. Poste ni atingis plantejojn de kafo kaj plue ni aŭskultis perfekte prononcatajn informojn pri ĉio ĉi, fare de Jean de Dieu Kikako (Johano de Dio Kikako).

Kunhavo de kontantaj dolaroj en la afrika lando estus supozeble danĝera. Sed Tanzanio montriĝis la plej sekura lando en la mondo. Nekonataj preterpasantoj afable bonvenigis min kaj amike ridetis. Same en Aruŝo kiel en Zanzibaro oni sentis sekurecon. Okazis neniuj atakoj tage, nek nokte. Tanzanianoj ne kontraŭstaras fotadon. Kiu ne volas esti fotita, tiu nur ŝirmas permane sian vizaĝon.

---

Instituto de Nacia Heredaĵo  
Tradukis: *Robert Kamiński*

## Lajkonik en Krakovo

*Lajkonik-Parado*, konata ankaŭ kiel la *Ĉevaleto de Zwierzyniec* (Konik Zwierzyniecki), estas ĉiujara kutimo - la spektaklo, kiu okazas sur stratoj de Krakovo en la oktavo de la festo Korpo de Kristo (la ĵaŭdo, sekvanta ĉi tiun feston), donante al la partoprenantoj de la evento senton de la daŭro de la komunumo dum tempo kaj formante gravan faktoron, kreantan grupan kaj individuan identecon.

Laŭ tiu kutimo oni formas buntan paradon marŝon tra Krakovo, kies ĉeffiguro estas rajdanto, vestita kiel tataro kaj „sidanta” sur artefarita ĉevalo; fakte moviĝanta sur siaj propraj piedoj. Ĝi rilatas al la legendo, konfirmita unuafoje en 1820, laŭ kiu Krakovo estis savita de la tatara invado en la 13-a jarcento. Kuraĝaj, vistulaj flosistoj, loĝantaj en la vilaĝo Zwierzyniec, ĉe la

antaŭurbo de Krakovo atakis la proksimiĝantajn tatarojn de embusko kaj mortigis ilian gvidanton. Tiam unu el la flosistoj vestis sin per vestoj de la tataro ĥano kaj triumfe eniris en Krakovon. Tamen, la faktaj originoj de la Lajkonik-kutimo estas neklaraj. Eble la kutimo devenas de la ĉevalrajda rito, populara inter la loĝantoj de vilaĝoj apud Krakovo, t.e. printempa promenado kun la ligna ĉevalo.



Dum la unua duono de la 19-a jarcento, formiĝis la vojo de la Lajkonik-parado kaj ĝi restas senŝanĝa ĝis nun. La plej grava rolanto dum la ceremonio estas, kompreneble, Lajkonik mem. Li estas viro, rajdanta sur la ligna ĉevalo, karakterizita kiel tataro. Vestite en la fantazia kostumo kun orientaj elementoj, li kiel tataro portas dikan, nigran barbon kaj tenas lignan sceptron en sia mano. La blanka, ligna ĉevaleto de la rajdanto, ankaŭ estas riĉe ornamita per seltuko kun perloj kaj koraloj, sonoriloj kaj pavoplumaro. Lajkonik sekvas procesion de 36 personoj. La procesio finiĝas per 9-persona grupo, nomata "Mlaskoty" (laŭ la nomo de la familio, kiu muzikis dum la ceremonio ĝis 1914). Ili ludas tradiciajn krakovajn melodiojn per violono, trumpeto, fluto, klarneto, harmoniumo, basa tubo kaj tamburo, laŭ kiuj Lajkonik prezentas dancojn dum la tuta procesivojo.

Partoprenantoj de la parado ne estas aktoroj, kiuj realigas skribitan scenaron; ili estas grupo de homoj bone konantaj precize difinitan, senŝanĝan sinsekvon de la festo Lajkonik. La kono estas transdonita al ili de la antaŭa generacio (kelkokaze familianoj) partoprenanta en ĝi. La grupanoj konscias pri la jarcenta tradicio, ili sentas sin fieraj estante membroj de la procesio kaj konsideras la ĉiujaran partoprenon en la ceremonio grava elemento de sia loka identeco.



La kutimo de Lajkonik estas nedisigeble ligita kun specifa kultura spaco, t.e. la itinero, sekvata dum jarcentoj de la procesio de la kvartalo Zwierzyniec ĝis la ĉefplaco. Tiu ĉi itinero rilatas al senŝanĝaj praktikoj kaj kondutoj de la procesianoj, ĉefe la dancoj de Lajkonik kun standardo, en la precize difinitaj lokoj kaj en fiksita tempo, aŭ vizitoj al ejoj, kiuj restis senŝanĝaj dum jardekoj. La Lajkonik-procesio karakterizaj kostumoj kaj ekipaĵoj de la membroj, kiuj estas uzataj nur unufoje jare, dum la procesio, kiel ankaŭ la loka muziko, ludata de la bando "Mlaskoty", kiu estas parto de la procesio.

Lajkonik certe estas tre grava tradicio por la partoprenantoj de la evento. Multaj el ili partoprenas en ĝi, ĉar ili sekvas siajn gepatrojn kaj geavojn, kiuj partoprenis en la procesio dum 20, 30 aŭ eĉ 40 jaroj. Multaj homoj konas la procesion ekde la infanaĝo, kiam ili rigardis ĝin kiel spektantoj.

(fotaj Vikipedio)

## Impresoj pri la 109-a UK en Tanzanio – la unua UEA-kongreso en Afriko

La 109-a Universala Kongreso de Esperanto okazis de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024, en la tanzania urbo Aruŝo. Tio estis la unua UK, organizita en Afriko. Al la kongreso aliĝis ĉ. 850 personoj el 65 landoj; ĉeestis preskaŭ 600 el 59 landoj, inter ili estis pli ol 20 poloj. Preskaŭ la tuta pola grupo flugis unue al la insulo Zanzibaro, kie ni pasigis kvar tagoj. La insulo dum la lastaj jaroj fariĝis populara vojaĝcelo de polaj turistoj. Zanzibaro allogas multajn turistojn pro siaj paradizaj pejzaĝoj kaj belegaj ripozlokoj.




En Zanzibaro ni havis okazon promeni sur plaĝoj, admirante belegajn pejzaĝojn, rigardi luksajn ripozlokojn kaj apudajn ege modestajn dometojn de loĝantoj. Ni ekskursis per boatoj sur la hinda oceano al proksimaj insuletoj kaj vizitis Stone Town – la ĉefurbon de la insulo. Apud historiaj konstruaĵoj kaj multaj bazaroj, la urbo estas konata, i.a. kiel naskiĝloko de la fama kantisto Freddie Mercury, en kies naskiĝdomo estas nuntempe muzeo prezentanta lian vivon kaj verkaron. Zanzibaranoj estas konataj kiel grandaj kultivantoj kaj eksportistoj de spicoj, kiel cinamo, pipro, zingibro, vanilo, kariofiloj, citronherbo, kurkumo, kardamomo, muskato k.a.

La dua parto de nia vojaĝo komenciĝis per unuhora flugo rekte al kongresurbo Aruŝo. En la urbo antaŭ la malfermo de la kongreso, poloj organizis busvojaĝon al la vilaĝo Tengeru, kie ni vizitis tombejon de polaj militrifugiintoj. Dum la dua mondmilito al Afriko venis kaj loĝis ĉirkaŭ 20000 poloj kaj en la vilaĝo dum dek jaroj vivis 5000. La ekskurson organizis Maciej Zięba el Lublin kun helpo de lokaj esperantistoj. Li invitis ankaŭ polan vickonsulinon de la Pola Ambasadego en Dar es Salam. Krystyna Fatyga

prezentis al nia grupo la historion de poloj loĝantaj en Tengeru kaj la nuntempan staton de la tombejo. La vizito estis vere kortuŝa kaj valora.



La Universala Kongreso de Esperanto konsistas el tradiciaj programeroj, kiel movada foiro, scienca kaj arta programo, prelegoj pri la lando-gastiganto, lernado de la loka lingvo kaj Esperanto kaj pritraktado de la kongresa temo, kiu ĉi-jare estis jena: "Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo". Okazis ankaŭ tradicia bankedo kaj kongresa balo, kiu unuafoje estis malfermita al ĉiuj kongresanoj. Ni havis okazon aŭskulti koncertojn de lokaj artistoj kaj konatulojn el Esperantujo: Jomo kaj Saŝa Filipović.



La kongresa turisma programo estis tre riĉa, ĉar en Tanzanio estas kelkaj mondfamaj naciaj parkoj, kie oni povas observi belegan naturon kaj sovaĝajn bestojn. Mi vizitis la Nacian Parkon Aruŝo, kiu situas apud la vulkano Meru, kie ni povis observi ĝirafojn, simiojn, zebrojn, bubalojn kaj fakoĉerojn. Ankaŭ interesa estis ekskurso al la kafoplantejo Meteruni sur deklivoj de Kilimanĝaro la plej alta monto de Afriko. La kafkultivistoj prezentis al ni etapojn de

kafo-preparado - de freŝa kafofrukto ĝis varma kafa infuzaĵo. Poste ni estis regalitaj per tuj-preparita kafo kaj bongusta tagmanĝo.

En Aruŝo, kiu ĉefe estas bazo por turismaj ekskursoj al naciaj parkoj kaj la monto Kilimanĝaro estas unika kaj vizitinda objekto – la Galerio de Afrika Arto. Mi vere rekomendas viziti la galerion, kie oni prezentas artaĵojn (penetraĵojn, skulptaĵojn, maskojn, meblojn, ktp) el la tuta kontinento. Tiu vere interesa loko, estas samtempe muzeo kaj vendejo, kie oni povas rigardi kaj aĉeti artaĵojn.

En Aruŝo troviĝas ankaŭ muzeo de altvaloraj juvelŝtonoj tanzanito, kiuj estas vere unikaj kaj haveblaj nur en tiu lando. En la muzeo oni prezentas diversajn specojn de la ŝtono, ĝian elfosadon, prilaboron kaj juvelojn kun tanzanitaj gemoj. En la kongresa programo estis ankaŭ vizito en Natura Muzeo en Aruŝo, kie oni povas ekoni la historion de prahomoj, kiuj aperis en orienta Afriko. La muzeo prezentas diversajn bestojn kaj informojn pri loka naturo. En la muzea korto kiel kuriozaĵo promenas vivanta grandega 200-jara testudo. Apud la muzeo troviĝas ĉarma "strateto de artistoj", kie eblas observi artristojn kreantajn siajn artaĵojn, kiuj poste oni povas aĉeti. Kolektantoj de ekzotikaj memoraĵoj povas viziti la Masajan Bazaron, kie aĉeteblas diversspecaj produktoj de lokaj metiistoj.

Tre interesa sperto estis partopreno en la ekumena diservo kaj la unua en Afriko katolika meso en Esperanto. Muziko, kiu akompanas mesojn en Afriko estas tute alia ol tiu en eŭropaj preĝejoj. Loka koruso vikle kaj laŭte kantas kaj moviĝas en la ritmo de muziko ludata de parokaj muzikistoj.

Iom malagrable estis ĉiutaga promenado tra la urbocentro, kie lokaj "vendantoj de ĉio" senĉese proponas al vi siajn varojn aŭ servojn. Turistoj donas al ili ŝancon gajni iom da mono kaj plibonigi ilian vivnivelon. Ili provas fari tion senlace de mateno ĝis nokto.

Kun aliaj polaj partoprenantoj de 109-a Universala Kongreso, mi restis en Tanzanio dum du semajnoj. La vizito estis por mi neforgesebla travivaĵo. Surprizis min multaj junaj afrikaj esperantistoj kaj ofte ilia tre bona lingvokono



kaj prononco. Por la Esperanto-movado UK en Afriko ankaŭ estas granda kaj signifa paŝo por disvastigado de la internacia lingvo sur ĉiuj kontinentoj. Mi esperas, ke la kongreso donos al afrikaj esperantistoj eblecon disvolvi la lokan Esperanto-movadon kaj plibonigi nivelon de la uzado de la internacia lingvo. Mi forte deziras tion al ili.

*Robert Kamiński*

## La detruita monumento al la juna Zamenhof

Okaze de la 102-a datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof, la 14-an de aprilo 2019 ĉe Zamenhof-strato, apud la Kościuszko-Placo estis inaŭgurita de la urbestro de Bjalistoko, la latuna statuo prezentanta la junan Zamenhofon. Ĝi fariĝis ofte vizitata objekto de la urbocentro.

La 11-an de aŭgusto ŝokitaj bjalistokanoj rimarkis, ke la ŝatata monumento estas detruita. La detruo plej verŝajne okazis nokte, la 10-an de aŭgusto. La figuro estis elŝirita de la trotuaro kaj faligita.

La vicurbestro de Bjalistoko, Rafał Rudnicki, diris, ke la monumento estas sekurigita kaj la Bjalistoka Urbooficejo raportos la kazon al polico. Li promesis, ke la oficejo faros ĉion, por rapide ripari la monumenton kaj restarigi ĝin en ĝia loko.

Post kelkaj tagoj la subinspektisto Tomasz Krupa deklaris, ke la enigmo de la falinta monumento estis solvita. Post la trarigardo de la registraĵoj de gvatkameraoj, la polico konstatis, ke okazis neniŭ malobeo de la leĝo kaj neniŭ damaĝo al posedaĵo kaj la procedo en ĉi tiu kazo estis ĉesigita pro manko de elementoj pri malpermesita ago.

La polico deklaris, la preterpasanta viro tuŝis la monumenton kaj ĝi falis. La registrado prezentita de la polico montras la momenton, kiam viro preterpasas la monumenton, haltas apud ĝi kaj post momento la figuro falas.

Rafał Rudnicki informis, ke oni supozas, ke la monumento jam estis difektita kaj tial ĝi falis.

Laŭ mi, estas du eblaj versioj de la evento: 1. La monumento havis misan konekton kun la metala bazo, fosita en la grundo sub la trotuaro kaj 5 jarojn



post ĝia instalado, la figuro apartiĝis de la bazo. Tio kaŭzis la falon de la skulptaĵo. 2. La monumento estis apartigita de sia bazo fare de vandaloj kaj lasita staranta. Pasanta viro tuŝis la figuron kaj faligis ĝin. Kiu versio estas vera, mi ne scias.

En 2017, kadre de la civitana buĝeto en Bjalistoko, estis prezentita por efektivigo de la projekto por konstrui la monumenton al L. Zamenhof. La 17-an de aŭgusto 2017 la urbestro de Bjalistoko anoncis konkurson por la monumento. La 29-an de novembro, la konkursĵurio aljuĝis la unuan premion al la projekto de Ryszard Piotrowski kaj Katarzyna Piotrowska. Sur la trotuaro ĉirkaŭ la figuro videblas disĵetitaj literoj de tri alfabetoj (latina, hebrea kaj cirila) el lalingvoj uzataj en la 19-a jarcento en Bjalistoko, kiuj estis inspiro por la posta iniciatinto de la internacia lingvo.

Baldaŭ post la difekto, la 15-an de aŭgusto, la urboservoj riparais la skulptaĵon, kiu estis metita sur sian antaŭan lokon.

---

*Robert Kamiński*

## Pri Esperanto en lingvistika revuo

Ĉi-jare, en la revuo "Językoznawstwo": (Lingvoscienco), n-ro 1(20)/2024 (e-ISSN: 2391-5137), estis publikigita pollingva artikolo de Joanna Satoła-Staškowiak el la Akademio pri Humanismo kaj Ekonomio en Łódź, titolita: „Esperanto. Utopia czy rzeczywistość”

(„Esperanto. Utopio ĉu realo”). Mi invitas al la legado.

<https://bibliotekanauki.pl/search?q=esperanto&scope=journals>,  
aŭ <https://mallonge.net/1gu>

## Teknikaj novaĵoj el la mondo

*Robert Kamiński*

## Pollando povas esti en la kosmo...

La pola raketo *ILR-33 Bursztyn 2K* atingis la spacon! La starto okazis la 3-an de julio 2024 en la bazo Andoya en Norvegio. La raketo atingis altecon de 100



kilometroj (kaj eĉ iomete superis ĝin), t.e. ĝi transiris la linion Kármán - la konvencian limon de la spaco. La pola raketo estis evoluigita de la Esplora Reto Łukasiewicz - Instituto de Aviado kaj uzis multajn novigajn solvojn. Unu el ili estas noviga brulaĵo, kiu estas bonega alternativo por la toksaj derivaĵoj de hidrazino kaj nitrogena rusto (nuntempe uzataj), uzante hidrogenan peroksidon (ĉe la koncentriĝo de 98%) kiel oksidanto. Ĉi tiu miksaĵo karakterizas altan rendimenton kaj la kapablo ekbruliĝi en la kosmo post miksado de la ingrediencoj. Ĝi estas ideala por uzo en raketmotoroj, estontaj satelitplatformoj, surteriĝiloj kaj la lastaj partoj de lanĉaj veturiloj.

Kaj la raketo mem malfermas al Pollando la vojon fari memstarajn eksperimentojn en la kosmo, interalie por esploro de atmosfero, lanĉo de sciencaj instrumentoj kaj eksperimentoj, faritaj kun la penso pri la evoluo de scienco, novaj teknologioj kaj industrio. La plej gravaj datumoj pri la flugo estas nuntempe prilaborataj kaj estos publikigitaj en la plej proksimaj tagoj.



## Vizitindaj lokoj

*Dariusz Caban*

### Hidrargo, punktoj kaj ŝlikrofi

Ĉion menciitan en la titolo oni povas trovi en unu loko - en la malnova slovena minurbo Idrija. La urbo troviĝas en la regiono Primorska, ĉe la rivero Idrija, ĉirkaŭ 60 km okcidente de Ljubljana, la ĉefurbo de Slovenio. Ĝi havas ĉirkaŭ 6 milojn da loĝantoj. La historio de la urbo datumas de la fino de la 15-a jarcento. En la jaro 1490 oni malkovris tie gangojn de hidrarga erco. Laŭ grandeco tieaj gangoj estis la duaj en Eŭropo, post gangoj en la hispana Almadén, kiuj estis ekspluatitaj de antikvaj tempoj.

Hidrargo (lat. *hydrargyrum*, *hydro* = akvo, *argyrum* = arĝento) estas kemia elemento en la perioda tabelo de Dmitrij Mendelejev, kun la simbolo Hg kaj la atomnumero 80. Ĝi estas peza, arĝentkolora metalo. La populara nomo de hidrargo estas „viva arĝento”, ĉar ĝi likvas en ĉambra temperaturo. En la

slovena lingvo hidrargo estas ĝuste „viva arĝento” – *živo srebro*. Ĝi estas toksa elemento, povas damaĝi i.a. homan hepaton kaj cerbon.

En la pasinteco hidrargo estis vaste uzata. Romianoj uzadis ĝin por minado de oro kaj arĝento. Hidrargan oksidon enhavis ruĝa farbo por kolorigo de lipoj kaj por pentrado. En lamezepoko per kombino de sulfuro kaj hidrargo alkemiistoj provis krei oron. La svisa kuracisto Paracelsus, en la 16-a jarcento, enkondukis hidrargajn komponaĵojn en medicinon kaj farmacion. Ankaŭ en teknikaj aparatoj hidrargo estis, kaj en iuj kazoj plue estas uzata: en certaj specoj de ŝaltiloj (plue aĉetebraj) kaj lampoj, termometroj, barometroj kaj aliaj mezuriloj. Nuntempe uzado de hidrargo plejparte estas malpermesata. Bezono por ĝi tre malgrandiĝis kaj oni ĉesigis ekspluatadon de gangoj en Idrija kaj Almadén.

Vagoneto kun lastaj elfositaj pecoj de erco de hidrargo

La minejo de hidrargo en Idrija funkciis inter la jaroj 1500 kaj 1995. Laŭ pritaksoj, dum tiu periodo oni akiris preskaŭ 146 milojn da tunoj de la likva hidrargo. La minejo konsistas el diversaj objektoj, nun kelkaj viziteblas. La plej malnova objekto estas ŝakto al la sankta Antonio. La ŝakton oni nomis honore al Antonio de Padovo, la patrono de ministoj kaj laprotektanto kontraŭ minejaj akcidentoj. La konstruaĵo de la ŝakto devenas de la 18-a jarcento, en ĝi estas enirejo al la vizitebla mingalerio. La subteran turisman vojon, en la mingalerio, oni ekfunkciigis en la jaro 1994, ĝi longas 1300 metrojn. Antaŭ la komenco de la vizito turistoj ricevas kontraŭakvajn jakojn, kaskojn kaj povas ricevi parolatan gvidlibron en sia patrolingvo (ili haveblas en 13 lingvoj). Super la enirpordo al la mingalerio troviĝas la surskribo “sreĉno”, kiu signifas “bonŝancon”, tio estis la tipa salutvorto de ministoj.

La vizito komenciĝas per filmo pri la historio de la minejo, poste ĉiĉerono kondukas turistojn laŭ la mingalerio. La ĉefa erco de hidrargo en gangoj de Idrija estas cinabro. Oni povas trovi ankaŭ indiĝenan hidrargon, en la formo de gutoj. Per manekenoj estas prezentata laboro de iamaj ministoj, kiuj uzadis simplajn ilojn: hakfosilojn, martelojn, segilojn. Tiuj simplaj iloj estis uzataj dum longa tempo – mekanizadon subtere oni enkondukis nur post la 2-a



mondmilito. En parto de la mingalerio turistoj povas vidi lignan sekurapogilon. La ligna apogilo havas kelkajn avantaĝojn: ĝi relative malpezas, facile ĝi fareblas, ĝian formon oni povas adapti al formo de ĉiu elfosaĵo, per kraketo ĝi signalas premon pligrandigitan per roka maso.

Dum promeno laŭ la mingalerio turistoj trapasas la barokstilan kapelon al Sankta Triuno, devenanta de la duono de la 18-a jarcento, la tempo de la plej granda prospero de la minejo. En la kapelo troviĝas altaro kun skulptaĵoj prezentantaj du gesanktulojn: sankta Barbaro kaj sankta Achacius. Sankta Barbaro estas la patronino de ministoj, arkitektoj kaj kanonistoj. Ŝi gardas kontraŭ subita morto. Sankta Achacius patronas al tiujn, kiuj timas morton, li estas alvokata dum malsanoj, en dubo kaj senesperaj situacioj.



En la elirejo de la mingalerio staras vagoneto kun la lastaj elfositaj pecoj de erco de hidrargo.

La ŝakto al sankta Antonio

Alia ŝakto, kun la nomo "Francisko", funkciis inter la jaroj 1792 kaj 1999. La ŝakton oni nomis honore al la rom-germana imperiestro Francisko, Habsburgo

la Dua. En ĝia konstruaĵo troviĝas piŝta vapormaŝino, konstruita en la jaro 1893, la plej granda en Slovenio kaj, probable, en Eŭropo. La ŝakton nun administras la Urba Muzeo.

Turistoj povas spekti ankoraŭ alian maŝinon – la lignan akvoradon *Kamšt*, la plej grandan en Eŭropo, kun diametro de 13,6 metroj. La akvorado, konstruita en la jaro 1790, movigis akvopumpilon, ĝi laboris preskaŭ 160 jarojn.

Al la minejo apartenis ankaŭ aliaj objektoj. Viziteblas la domo por ministoj, konstruita en la 18-a jarcento. La magazeno por greno kaj aliaj manĝaĵoj, konstruita en la jaro 1784, funkciis ĝis la jaro 1912, nuntempe en tiu konstruaĵo troviĝas biblioteko kaj arta galerio. Tuj apud la iama magazeno staras la konstruaĵo de teatro la plej malnova en Slovenio, konstruita en la jaro 1769. Nun ene en ĝi troviĝas kinejo kaj kulturcentro.

La urbon Idrija famigas ankaŭ du objektoj. La unua estas la preĝejo al Sankta Triuno, starigita sur la loko, kie unuafoje oni trovis hidrargon. La dua estas la renesanca kastelo *Gewerkenegg*, konstruita inter la jaroj 1522 kaj 1533

por administrantoj de la minejo. Ĝis la 19-a jarcento en la kastelo troviĝis ankaŭ la magazeno de hidrargo. En la mezo de la 18-a jarcento oni renovigis la kastelon en la baroka stilo. Ĝia arkadumita korto estas ornamita per rokokaj pentraĵoj. La minejaj administrantoj uzadis la kastelon ĝis la jaro 1940, nun ene funkcias la urba muzeo kaj muzika lernejo.

Sur la dekstra bordo de la rivero Idrija troviĝas fandejo, kiu funkciis inter la jaroj 1880 kaj 1995 (antaŭ la jaro 1880 ercon de hidrargo oni fandis en la alia loko de la urbo). Hodiaŭ en tiu objekto videblas ekspozicio de diversaj instalaĵoj, maŝinoj kaj aparatoj, i.a. sistemo de pendigitaj ĉaroj por transportado de erco, transporta bendo, resona kribrilo.

Idrija famas ankaŭ pro punktoj de rubanda tipo kun floraj motivoj. La plej malnovaj skribaj mencioj pri punktofarado en tiu urbo devenas de la jaro 1696. En la jaro 1860 oni establis tie la unuan vendejon kun punktoj kaj en la jaro 1876 ekfunkciis, ekzistanta ĝis nun, lernejo pri punktoarto. La punktoj estas farataj per simplaj iloj: rulilo, pingloj kaj sep bobenoj. En multaj lokoj de la urbo renkonteblas punktoj kaj punktaj motivoj: super stratoj, en strataj trapasejoj, sur trotuaroj. Somere, en Idrija okazas la Internacia Festivalo de Punktoarto.

Post la vizitoj en la minejo kaj fandejo, indas iri al restoracio kaj gustumi pasteĉojn, nomatajn *idrijski žlikrofi*. Ili estas boatetformaj kaj plenigitaj per terpoma farĉo. En restoracio oni povas mendi aron de pasteĉoj kun aldono de fungoj, kremo kaj viando. Oni povas ilin manĝi ankaŭ kun bulkeroj frititaj en butero. Recepto por fari pasteĉojn *žlikrofi* devenas de la mezo de la 19-a jarcento, nun ĝi facile troveblas en interreto.

De la jaro 2012, la minejo en Idrija troviĝas sur la listo de Monda Heredaĵo de UNESKO. Planante feriojn en Slovenio, ne forgesu pri vizito ankaŭ en Idrija. La urbo kaj tieaj industriaj malnovaj objektoj vere spektindas.

(Ĉiuj fotoj faritaj de la aŭtoro)

## Lingvosciencia angulo

*Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*

### Lokaj rolvortetoj – *Preter*

#### Loko de moviĝo

*Preter* montras lokon, ĉe kies flanko okazas movo. La movo normale pluiras for de tiu loko:

- *Li pasis **preter mi** sen saluto. Li pasis flanke de mi.*
- *Elizo devis iri tute proksime **preter ili**. Ŝi pasis flanke de ili.*
- *La fiŝoj, kiuj naĝis en la akvo, fulmorapide preterflugadis **preter miaj oreloj**.*
- *Li dronis en la rivero, kiu fluis proksime **preter la urbo**.*

### Loko sen moviĝo

Preter povus ankaŭ montri lokon, kiu estas atingebla per movo flanke de io. Tiaj frazoj estas tamen tre maloftaj: Mia hejmo troviĝas **preter tiuj arboj**. Se vi volas atingi mian hejmon, vi devas iri preter tiuj arboj. Simila uzo estas ebla sed same malofta ĉe tra. Ĉe trans tia uzo estas tamen tute normala.

### Preter + direkta N-finaĵo

Por klare montri, ke pretermovo pluiras for de la afero, oni povas uzi preter + N-finaĵon. Jam simpla preter povas havi tian signifon kaj oni uzu N-finaĵon nur kiam tio helpas al klareco:

- *Ĝi iris al li **preter la buŝon**. = Li ne sukcesis profiti de ĝi.*
- *La vojo kondukis **preter preĝejon**. = La vojo ne finiĝis ĉe la preĝejo.*

Komparu kun similaj uzoj de ĉirkaŭ, tra, trans kaj kontraŭ.

### Figura uzo

- *Li agas **preter ĉia racio**. Li tute ne uzas racion.*
- *La pesto pasis **preter tiu urbo**. La pesto ne trafis tiun urbon.*

### Vortfarado

- *Pretere = "preter io": La arbaroj estis densaj kaj mallumaj, [...] kaj **pretere** oni vidis grandajn kastelojn el vitro kaj marmoro. = ... preter la arbaroj ...*

## Literaturaĵoj

En 2024, kiel parto de la ĉiujara aranĝo *Nacia Legado* iniciatita de la prezidento de Pollando, oni legis romantikan dramon "Kordiano" de Juliusz Słowacki. La verko estis skribita en Ĝenevo en 1833 kaj anonime publikigita en Parizo en 1834. Bjalistoka Esperanto-Societo tradicie eldonis tiun ĉi verkon en Esperanto. La libron esperantigis Lidia Ligeża. Ĉi-sube ni prezentas fragmenton de la unua akto de ĉi tiu dramo.

Informoj pri la libro troviĝas en la ĉapitro „Oni eldonis”.

### “Kordiano” (fragmento)

#### UNUA AKTO - SCENO UNUA

*KORDIANO, juna 15-jaraĝa knabo, kuŝas sub granda tilio sur la vilaĝa korto; GREGORO, maljuna servisto, iom apude purigas ĉasistan armilon. De unu flanko oni vidas vilaĝan domon, de la alia ĝardenon... malantaŭ la korto-barilo: lageto, kampoj – kaj pinarbaroj.*

KORDIANO enpensiginta

Li sinmortigis – juna. Ia timo  
Tuj metis damnon de ag' en la buŝon.  
Ĝi estis por mi moroza averto,  
Por estingi flamantajn pensojn tuje;  
Nun mi neglektas stultan antaŭzorgon  
De l' pleb' kaj admonon, fajras, ardas,  
Kiel floro per folioj malfermaj  
Kaptas aeron kaj impresojn voras,  
Penson de Di' el teraj aĵoj legas,  
Demandas rokojn pri fajrer' de flamo.  
Ĉi lag' ĉielon sentas spegulitan  
Kaj pensas per ĝia bluo.  
Ĉi aŭtun' milda, kiu pintojn arbajn  
Skuas, venenas foliojn  
Kaj rozajn fruntojn disblovas,  
Simila al mort' anĝela,  
Softe diris al arboj: – Vi pereu!  
Ili velkis – defalis.  
Pens' pri mort' natura en anim' sin transverŝas;  
Moroza, sopiranta, pala  
Mi rigardas morton de floroj  
Kaj al mi ŝajnas, ke min vent' disblovas.  
Silente. Sur herbejoj blekado de gregoj,  
Iras gregoj tra herboj grincantaj pro prujno  
Kaj al pala ĉielo turnas fridajn kapojn  
Kvazaŭ demandus: Kie estas velkaj floroj?  
Kie floroj papavaj sur bedaj rubandoj?  
Softe, senhome, froste. El vilaĝ-preĝejo  
Sonoril' de vesperaj preĝoj sone batas,  
El torporo de herboj ĝi preĝon ne igos:  
L' tero preĝos, nur kiam vivigos ĝin l' suno.  
Jen mi mem kiel arbo per frost' febligita,  
Cent en mi deziregoj, cent sentoj kaj velkaj  
Folioj, se pli forte blovas, multon ŝiras.

Celo de sentoj – velko; voĉ’ de sent-susuro  
Sen vorto-harmonio. Batu en min tondro!  
Por ekbruligi en mi ian grandan penson.  
Dio! Prenu el l’ koro hirund-maltrankvilon,  
Donu al la viv’ animon, profetu celon!  
Vi unu penson grandan igu, flaman, ardan,  
Kaj mi fariĝos ĝia ilo kaj horloĝo,  
Sur l’ vizaĝ’ mi ĝin montros, puŝos per korbato,  
Dissonoros per vortoj kaj finos per vivo.

*Post momento*

Mi en amon fatalan tutkore eniris...  
Li pensas – poste sin turnas subite al GREGORO.  
Gregor’, ĵetu pafilon.

GREGORO

Mi finis laboron.  
Kion sinjor’ ordonos?

KORDIANO

Iru tien, oldul’,  
Mi enuas.– 28 –  
Moroza, sopiranta, pala  
Mi rigardas morton de floroj  
Kaj al mi ŝajnas, ke min vent’ disblovas.  
Silente. Sur herbejoj blekado de gregoj,  
Iras gregoj tra herboj grincantaj pro prujno  
Kaj al pala ĉielo turnas fridajn kapojn  
Kvazaŭ demandus: Kie estas velkaj floroj?  
Kie floroj papavaj sur bedaj rubandoj?  
Softe, senhome, froste. El vilaĝ-preĝejo  
Sonril’ de vesperaj preĝoj sone batas,  
El torporo de herboj ĝi preĝon ne igos:  
L’ tero preĝos, nur kiam vivigos ĝin l’ suno.  
Jen mi mem kiel arbo per frost’ febligita,  
Cent en mi deziregoj, cent sentoj kaj velkaj  
Folioj, se pli forte blovas, multon ŝiras.  
Celo de sentoj – velko; voĉ’ de sent-susuro  
Sen vorto-harmonio. Batu en min tondro!  
Por ekbruligi en mi ian grandan penson.  
Dio! Prenu el l’ koro hirund-maltrankvilon,  
Donu al la viv’ animon, profetu celon!  
Vi unu penson grandan igu, flaman, ardan,

Kaj mi fariĝos ĝia ilo kaj horloĝo,  
Sur l' vizaĝ' mi ĝin montros, puŝos per korbato,  
Dissonoros per vortoj kaj finos per vivo.

*Post momento*

Mi en amon fatalan tutkore eniris...

*Li pensas – poste sin turnas subite al GREGORO.*

Gregor', ĵetu pafilon.

GREGORO

Mi finis laboron.

Kion sinjor' ordonos?

KORDIANO

Iru tien, oldul',

Mi enuas.

GREGORO

Nenio nova, kion fari?

Se vi volas, mi diras valoran fabelon:

Mi havas en skatolo cerba anekdotojn

Post la avino, kiu jam en Di' ripozas –

Vi preferas rakonton, aŭ eble kanteton?

KORDIANO silentas; GREGORO diras jenan fabelon.

En lernejo estis iam

Joĉjo, la infano bela,

Sentis frue volon Dian,

Egan guston al barelo.

Estus li soldato-taŭro,

Ĉar neglektis liter-konon;

Ofte olda bakalaŭro

Frakasis sur li bastonon:

Kaj post centa, centa provo

Diris al Joĉja patrino:

„Prenu lin, enbati povo

Ion al li – vana. Fino”.

Povra ino prenis filon,

Iris al pastr' por konsilo;

Ploris ĉe la parokestro.

Li aŭskultis vean plendon,

La frunton sulkis atente,

Faris patran favor-geston;

Aŭskultinte pri malbono

Diris: „Rigardu senflata





En l' okulojn. Jen fripono";  
Donis groŝojn kaj oblaton  
Kaj eldiris la konsilon:  
Al ŝuisto donu filon...  
Laŭ konsilo la patrino  
Ĉion faris... sed la filo  
Ne prezentis fak-inklinon,  
Ne gustumis en kudrilo.  
Satan' miksis lian galon,  
Joĉjo songis ĝuojn distajn;

## Saĝaj pensoj

*Maciej Jaskot*

### Pri rutinoj

Rutinoj foje estas subtaksataj en la moderna socio, kie oni ofte emfazas spontanecon kaj la neceson serĉi novajn spertojn. Tamen, ĉiutagaj agoj, ripetigantaj kaj okazantaj sen longdaŭra pripensado formas ŝtofon de nia vivo. Ili organizas la ritmon kaj difinas la kadron de niaj tagoj, reguligas nian bonfarton kaj eĉ pensmanieron, kelkfoje influante la decidojn, kiujn ni prenas.



Kutime oni pensas, ke la gravaj momentoj de nia vivo - tiuj rilatantaj al familio aŭ kariero - forĝas nian karakteron, sed se ni sekvas la penson de Aristotelo, ni devus tion rekonsideri. La grandaj eventoj estas ja gravaj, sed ili maloftas. Male, niaj ĉiutagaj agoj - tiuj, kiujn ni kutime konsideras malpli gravaj - estas konstante ripetataj kaj tial havas multe pli grandan efikon al nia etika evoluo. La ĉiutaga rutino, plena je simplaj agoj evidentiĝas potenca, ĉar ĝi povas fortigi aŭ malfortigi nian karakteron. Ĉi tiu perspektivo helpas valori la rutinon kaj rimarki ties filozofian signifon.

Alfronti la ĉiutagan vivon kun disciplino, pacienco kaj akcepto de tio, kion ni ne povas ŝanĝi - jen al kio invitas stoikismo, por kies adeptoj kiel Epikteto kaj Marko Aŭrelio la mondo estis kaosa kaj ofte neantaŭvidebla, sed niajn ĉiutagajn agojn ili vidis kiel konstantan ŝancon por praktiki sinfortigadon kaj

trankvilon. Ni ne povas ĉiam regi tion, kio okazas al ni, sed ni ja povas lerni regi niajn reagojn al la mondo kaj ni lertiĝas en tiu ĉi kapablo per niaj ĉiutagaj agoj.

Marko Aŭrelio skribas en la kvina libro de siaj *Meditaĵoj* (aŭ *Pensoj al si mem*): “Kiam vi leviĝas matene, pensu pri la privilegio esti viva, spiri, pensi, ĝui, ami”. La stoikistoj instigas nin trovi signifon en ĉiu momento, precipe en la ĉiutagaĵoj. En tiu ĉi filozofio, kiu fakte estas tre praktika aliro al la vivo, ne temas nur pri tio, kiel ni alfrontas tragediojn aŭ krizojn, sed pri maniero reagi al ĉiutagaj ĝenoj, konfliktoj kaj taskoj.

La filozofio de ĉiutagaj agoj, rigardata laŭ diversaj filozofiaj tradicioj aŭ skoloj, emfazas la signifon de rutino en la homa vivo. Ĉu ni alproksimiĝas al rutinoj kiel al maniero evoluigi nian karakteron, praktiki spiritan konscion, aŭ enkorpiĝi etikajn valorojn, ĉiutagaj agoj evidentiĝas potencaj en nia ekzistado. Ili formas la strukturon de nia vivo, donas ŝancojn por pripensoj, kresko kaj eĉ renoviĝo. Komprenante, ke simplajn, ripetigantajn agojn oni povas utiligi por filozofie aliri la vivon, oni komencas trovi profundan signifon en la ĉiutagaĵoj. Kie la mondo vidas monotonecon, la filozofo vidas okazojn por iĝi pli saĝa, kaj kie la mondo vidas ĉiutagan aŭtomecon, la filozofo vidas eblecon iĝi pli konscia kaj libera.

## Leterkesto



Povilas Jegorovas,

### BET invitas

La 59-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj denove okazos en Litovio de la 5-a ĝis la 13-a de julio, 2025, ĉi-foje en Kaunas la dua laŭ grandeco urbo de Litovio. La aranĝo okzos en la Universitato Vytautas la Granda, kiu kun Monda Centro de Litovoj estas kunorganizantoj de BET-59. Litova Esperanto-Asocio invitas vin ĉiujn partopreni kaj parto-prenigi aliajn.

Detalaj informoj pri la aranĝo estas en la Unua informilo pri BET-59 ĉi-tie: <https://mallonge.net/1gq> kaj aliĝilo al BET-59 estas trovebla ĉi-tie: <https://mallonge.net/bet59>

Baltiaj Esperanto-Tagoj en 2025 havas ĉiuf flankan subtenon kaj helpon de la urbaj instancoj de Kaunas kaj ankaŭ de la landaj ŝtataj instancoj de Litovio. BET-anoj havos luksajn kondiĉojn de partopreno kaj ripozo.

La programo kiel kutime dum BET-oj estos tre varia kaj interesa. Ni atendas ne malpli ol 500 partoprenantojn el 30-40 landoj.



Konstante aktualigataj ĉiusepacaj informoj pri BET-59 estas en la retejo de LEA : <https://mallonge.net/1gr> kaj retejo Eventa Servo.

Bonvolu plani vian partoprenon en tiu ĉi internacia esperantista aranĝo kaj disvastigi informojn pri la sekvontjara BET en diversaj internaciaj kaj viaj landaj esperantistaj informkanaloj. La aranĝo estos multnombra kaj interesa. Partoprenu mem kaj invitu aliajn. Esperante, ke vi kaj multaj aliaj esperantistoj alvenos al Kaunas venontjare.

Amike, Povilas Jegorovas, prezidanto de Litova Esperanto-Asocio. Tel. +370 687 12219, [pjedorovas@yahoo.com](mailto:pjedorovas@yahoo.com)



**RETA KURSO de ESPERANTO** - ekde la 12-a de oktobro 2024 (sabato) **MEZGRADA KURSO** (por ajnalandanoj) – je la 12.30 h.(UTK) en ZOOM. Daŭro de la kurso – 6,5 monatoj. Kursaĝvidanto – diplomita instruistino pri fremdaj lingvoj, membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) – Tatjana Georgijevna Loskutova je subteno de la Internacia Ligo Esperantistoj-Instruistoj (ILEI).

Aliĝo: [esperanto-kurso@mail.ru](mailto:esperanto-kurso@mail.ru)

## Kalendaro de Esperanto-aranĝoj

18-21.7. 2024	41-a Pola Esperanto-Kongreso en Kalisz	Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio PEA-Filio en Kalisz, <a href="http://www.esperanto.pl">www.esperanto.pl</a> , <a href="mailto:kongreso@esperanto.pl">kongreso@esperanto.pl</a>
25.8. 2024	Montara ekskurso de esperantistoj Klimczok - Szczyrk	Pola Esperanto-Asocio, Filio en Bielsko-Biała
9.2024	57-a Internacia E-Feriado – ne okazis	Silezia Esperanto-Asocio,
13-15. 9.2024	38-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto ARKONES en Poznań	Kultura-Socia Societo E-Esenco en Poznań, <a href="http://www.arkones.org/tobiasz@esenco.org">http://www.arkones.org/tobiasz@esenco.org</a>
11-13. 10.2024	48-aj Esperanto-Preĝtagoj en Częstochowa	Pola Sekcio de IKUE kaj animzorganto pastro Roman Gmyrek
9-11. 11.2024	26-a GRUPE. Gliwice'a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto	Pola Esperanto-Asocio, Filio en Gliwice, Marian Wolny <a href="mailto:esperanto_gliwice@poczta.onet.pl">esperanto_gliwice@poczta.onet.pl</a>
22-24. 11. 2024	Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo ĈAR 2024 en Kraków	Pola Esperanto-Junularo

9.12.24	Zamenhof-Tago en Nowy Sącz Al. Wolności 23	PEA-Filio Nowy Sącz bozena.kocyc@gmail.com
13-15. 12.2024	25-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj	Bjalistoka Esperanto-Societo, <a href="http://www.espero.bialystok.pl">http://www.espero.bialystok.pl</a>
18.12. 2024	Renkontiĝo okaze 50-a datreveno de la kreo de aparta Esperanta Librokolekto Biblioteko de Katolika Universitato de Lublin (horo: 10.00-12.00)	Biblioteka KUL, Krzysztof Śliwiński, Maciej Zieba
14-26. 6.2025	47-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno-Unieście	Pola Esperanto-Asocio, Filio en Gliwice aleksander.zdechlik(heliko)gmail.com tel. +48 664 171 168

### Elektitaj aranĝoj en najbaraj landoj

18-25.8. 2024	Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Kopų g. 21, 00338 Sventoji, Palanga, Litovio	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, <a href="http://ijk2024.tejo.org">ijk2024.tejo.org</a>
7-10.11. 2024	Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko. Žilina, Slovakio	<a href="https://kaest.ikso.net/2024/">https://kaest.ikso.net/2024/</a>
5-13.7. 2025	59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj Kaunas en Litovio	Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas Tel. +370 687 12219, <a href="mailto:pjedorovas@yahoo.com">pjedorovas@yahoo.com</a>

### Universalaj Kongresoj de UEA

3-10.8. 2024	109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo en Tanzanio	Universala Esperanto-Asocio, <a href="http://uea.org">uea.org</a>
26.7.- 2.8.2025	110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno en Ĉeĥio	Universala Esperanto-Asocio, <a href="http://uea.org">uea.org</a>

## Diverse, facile, bonguste

### Žlikrofi el Slovenio

Ingrediencoj: faruno - 500 g	fumaĝita porkflankaĵo- 300 g
ovoĵ - 3-4	ŝenoprazo (verdaj folioj de cepo), -
oleo - 2 kuleroj	kelkaj pecoj
terpomoj - 1 kg	fajngrajna, jodigita mara salo

Preparado: Knedu farunon, ovojn, pinĉaĵon da salo, aldonante varman akvon, ĝis molan, elastan paston.

Metu en bovlon kaj kovru per folio - lasu en varma loko por 30-60 minutoj.

Boligu terpomojn, drenu, premu tra dispremilo kaj starigu por malvarmigi. Haku porkflankaĵon fajne aŭ muelu ĝin kaj fritu ĝis bruniĝo. Poste kunligu kun la terpomoj.

Aldonu tranĉitan ŝenoprazon, salon kaj pipron al la malvarma farĉo - knedu en bone miksitan mason.



Disruligu la paston ne tro maldike, eltranĉu malgrandajn kvadratetojn aŭ disketojn, plenigu ilin per la farĉo, bone kungluu la randojn kaj kuiru en iomete saligita, bolanta akvo (kun oleo) dum 8-10 minutoj.

Pasteĉoj žlikrofi. Foto Dariusz Caban

La pasteĉetoj povas esti servataj kun butero, fandita bru-nigita lardo aŭ rostita

pecigita bulko. En Slovenio, ili ankaŭ estas servataj kun porkaĵo, stufita en la propra suko kaj kun la fungosaŭco.

## Oni eldonis

### “Jazzowe Haiku”

Aŭtorino: Urszula Zybura

Lingvoj: pola, Esperanto

Traduko kaj korekto: Urszula Zybura

Kovrilon projektis: Danuta Witkowska

Grafikaĵoj bazitaj sur fotoj de Eligiusz Zybura

Eldonis: Literatura Fondaĵo “Kiel manpreno”


ISBN 978-83-67860-24-6

Grandeco 12 x 18 cm

Kolekto de poemoj en poezia prozo



“**Kordiano**” (Kordian)  
Aŭtoro: Juliusz Słowacki  
Tradukis: Lidia Ligęza  
La kovrilon projektis:  
Przemysław Wierzbowski  
Eldonis: Bjalistoka Esperanto-  
Societo,  
<https://espero.bialystok.pl>  
ISBN 978-83-962222-9-9



## Forpasis

Kun bedaŭro ni informas, ke la 7-an de julio 2024 forpasis **Jaroslav Suchánek**, merita ĉeĥa esperantisto, doktoro pri natursciencoj kaj iama ĉeĥa ambasadoro en Aŭstralio, kiu aktive partoprenis esperantistan vivon en Ostrava kaj en pola flanko de Silezio. Li estis humurplena kaj simpatia persono, kiu organizis renkontiĝojn sur monto Ĉantorio (ĉe la pola-ĉeĥa landlimo) neforgeseble ludante gitaron, kantante kaj interese rakontante.  
Amikoj

La 4-an de junio 2024 en Łódź forpasis en la aĝo de 96 jaroj, esperantistino **Genowefa Gałas**.

La adiaŭa ceremonio okazis la 11-an de junio 2024 sur la romkatolika tombejo ĉe la str. Szczecińska 96/100 en Łódź  
Kun granda bedaŭro informas membroj de PEA-Filio en Łódź

Kun granda bedaŭro ni informas, ke la 19-an de septembro 2024 en Gdańsk mortis esperantisto **Marian Możuch**. La adiaŭa ceremonio kaj entombigo okazis la 23-an de septembro 2024 en la kapelo de la Tombejo Łostowice ĉe la str. Łostowicka 35 en Gdańsk  
Estraro de PEA

Kun granda bedaŭro ni informas, ke la 6-an de novembro 2024 en Siedlisko forpasis en la aĝo de 94 jaroj, esperantistino **Bożena Pietrzyk**. La adiaŭa meso kaj entombigo okazis la 9-an de novembro 2024 sur la tombejo Komunalny en Siedlisko Estraro de PEA

## El fotogalerio de Andrzej Sochacki

*Andrzej Sochacki*

### La dua Balta Esperanto-Forumo, 17–22 julio 2003.

55 partoprenantoj el ses landoj partoprenis en la dua Balta Esperanto-Forumo en Olsztyn. La aranĝon kunorganizis: Warmia-Mazuria E-Societo kaj Esperanto-revuo „La Ondo de Esperanto”.

La ĉefan temon de la forumo estis “Slavaj influoj en Esperanto”. Ĝin prelege prezentis Aleksander Korĵenkov. Okazis ankaŭ aliaj prelegoj: „Esperanto-vortaroj en la reto” (prelegis: Witold Czerwiński), „Interkultura komunikado per Esperanto kaj la angla” (Ilona Koutny), „Esperanto Eŭropa Unio” (Johan Derks), „Olsztyn” (Elżbieta Leonowicz-Frenszkowska), „Prusujo sen legendoj” (Wolfgang Kirschstein), „Nevidantoj” (Irena Łowińska), “Solidareco” en Kaliningrad (Alen Kris), „Nacia, eŭropa, internacia - niveloj de identeco” (Zbigniew Galor), „Siberio” (Aleksej Birjulin).

Nora Caragea rakontis pri siaj tradukoj. Okazis ankaŭ diskutseminario kun aktivuloj el norda Pollando, Litovio kaj Kaliningrada regiono, dum kiu oni pridiskutis temon: “UEA: de problemoj al krizo”. Alia diskutrondo estis dediĉita al la Esperanta gazetaro.

La kunvenon riĉigis interkona vespero ĉe bivakfajro, pola vespero en regionstila restoracio *Karczma Warmińska* kaj orgena koncerto en la urba katedralo. La adiaŭa vespero, dum kiu amuzis partoprenantojn per kviza programo Marian Zdankowski, finis riĉan programon.

Fotis Andrzej Sochacki



La salono dum prelego



Prelegas Ilona Koutny



Marian Zdankowski  
dum E-kvizo





Vespera renkontiĝo




La partoprenantoj en  
kastelo de Olsztyn



Grupa foto en subĉiela  
muzeo en Olsztynek

⇒ Daŭrigo el la paĝo 7 – 41-a Pola Esperanto-Kongreso



Fotis Robert Kamiński



La 30-an de junio 2024 Esperan-  
tistoj el Sopot montris ekspozicion  
pri familio de Zamenhof en  
Biblioteko Chylonia en Gdynia





41-a Pola Esperanto-Kongreso en Kalisz, 18-21.07.2024 Foto: A.Sochacki.



Plantado de ruĝa kverko **ESPERANTO** en Kalisz  
20.07.2024



41-a Pola Esperanto-Kongreso en Kalisz, Foto: A.Sochacki